

Heinrich Heine,	Heinrich Heine,	Heinrich Heine,	Heinrich Heine,	Heinrich Heine,
En la mirinda bela Maj',	En dolĉega Maj'	Im Mai	En admirinde bela maj'	En Majo
<i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i>	<i>tradukita de Friedrich Pillath</i>		<i>tradukita de Hans-Georg Kaiser</i>	<i>tradukita de Manfredo Ratislavo</i>
En la mirinda bela Maj', dum sin burĝonoj fendis, en mia kor' la amon mi disvolviĝi sentis.	Printempe en dolĉega Maj', Dum la burĝonoj krevis, El mia koro ĝerme Amsento sin ekle- vis.	Im wunderschönen Monat Mai, Als alle Knospen sprangen, Da ist in meinem Herzen Die Liebe aufgegan- gen.	En admirinde be- la maj', dum jam burĝonoj krevis, jen ankaŭ miako- re la amo sin ekle- vis.	En Majo, kiam ĉiuj Burĝonoj mal- fermiĝis, La amo kiel floro En mia kor' estiĝis.
En la mirinda bela Maj', dum birda tril' ne ĉesis, al ŝi sopiron mi- an konfide mi kon- fesis.	Printempe en dolĉega Maj', Dum birda kanto sonis, De l' kora mi sopi- ro Konfeson al ŝi do- nis.	Im wunderschönen Monat Mai, Als alle Vöglein san- gen, Da hab' ich ihr ge- standen Mein Sehnen und Verlangen.	En admirinde be- la maj', dum birdotril' senbridis, jen mi al ŝi sopi- rojn, dezirojn, ekkonfi- dis.	En Majo, kiam ĉiuj Birdetoj sin aŭdigis, Al ŝi deziron mian Sopiran mi sci- igis.
...	...	...	...	...

Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (*Kalmano Kaloĉajo*, \*1911 - †1976).

Arg-203-1082  
(2010-05-26  
12:08:05)

Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

Tiu ĉi traduko aperis en *Elektitaj Poemoj*, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich\\_Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17).

Arg-203-402 (2004-03-24 07:28:07)

Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „Buch der Lieder“, im Abschnitt „Lyrisches Intermezzo“, Nr. I.

Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (*Cezar*, \*1954-05-21).

Arg-203-431  
(2004-03-24  
07:33:04)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.

Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (*Manfred Retzlaff*, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982-11-14.

MR-002-4 /  
Arg-203-403  
(2004-04-05  
20:37:00)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.